
Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Julio - Aŭgusto 2016 | n-ro 07–08 (1333-1334)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Viroj estas....



Viroj estas kiel vino. Oni devas piedbati ilin kaj enfermi en iu malhelo, por ke ili iom maturiĝu tiel, ke oni ŝatas ilian ĉeeston ĉe la manĝado.

*Britney Spears, usona kantistino*

La bona je la vintro estas, ke neniuj viroj videblas kun ŝortoj.

*Martina Navratilova, usona tenistino.*

Vira stulteco plej plezurigas min. Danke al Dio ĝi estas neelĉerpebla fonto de amuzo.

*May Wortley Montagu, britlanda verkistino*

Estas du specoj de viroj : unu speco havas monon pro sia edzino, kaj la aliaj havas sian edzinon pro sia mono.

*Elizabet Taylor, angla aktorino*

Kiel aspektus la mondo sen viroj ? Nek estus perforto, nek militoj kaj amaso da dikaj feliĉaj inoj.

*Nekonata*

Kompreneble oni devas preni la virojn tiaj, kiaj ili estas, sed oni tute ne lasu ilin tiel.

*Zsa Zsa Gabor, hungara-usona aktorino*

Viroj atingas sian plej grandan efikon ĉe la farado de aferoj, kiuj tute ne devas esti faritaj.

*Brooke Shields, usona aktorino*

La spirita mezpunkto de loĝkomunumo de viroj estas kesto plena de biero.

*Nekonata*

La viro taksas sin jam inokonanto, se li faras la eraron je ĉiu ino.

*Hillary Clinton, usona politikistino*

Viroj estas ja ofte tiom junaj, kiom ili sentas sin, sed neniam tiel elstaraj.

*Simone de Beauvoir, franca verkistino*

Se viro kuiras por vi kaj la salato entenas pli ol nur tri ingrediencojn, li celas seriozan.

*Penélope Cruz, hispana aktorino*

Kie estus la potenco de la inoj sen la vanto de la viroj ?

*Marie de Ebner-Eŝenbaĥ, aŭstria verkistino*

Viroj demandas infanojn, kion ili volas fariĝi pli poste , ĉar ili mem ankoraŭ serĉas ideojn.

*Susan Sarandon, usona aktorino*

Ne havas sencon kvereli kun viroj ; ili ja tamen ĉiam malpravas.

*Zsa Zsa Gabor, aktorino*

Viroj havas decidan avantaĝon : ni sulkiĝas, fariĝas grasaj kaj kalvaj aŭ blankhararaj, sed neniun tio ĝenas.

*George Clooney, usona aktoro*

Viroj estas kiel monŝparujoj : tiuj, en kiuj plej malmulte estas, plej bruas.

*Nekonata*

Ĉiu viro estas manskripto, kiu unue estas korektenda.

*Katarina la Granda, carino*

Je Kristnasko oni komprenas plej malmulte, kial viroj necesas.

*Donna Leon, usona verkistino*

Vanteco de unu viro sufiĉas por dek inoj.

*Dunja Rajter, kroata kantistino kaj aktorino*

Afero, pri kio instruis min la politiko, estas, ke viroj estas nek mense gvidataj nek komprenebla genro.

*Margaret Thatcher, britlanda politikistino*

Viroj estas tiel simplaj. Oni devas doni nur telefonon kun multaj butonoj al ili, kaj jam ili pensas, ke ili estas gravaj.

*Elfriede Jelinek, aŭstra verkistino*

*Tradukis kaj elektis* Donjo & Cezar

**(NdR) Tiu paĝo, kaj ankaŭ la kovrilpaĝo, vekis ĉe kelkaj reagojn pro "seksismo". Kion vi opinias tiurilate ?**

## ✍ REDAKTANGULO

Karaj legantoj,

Jen, kun malfruo, la julia-aŭgusta numero de *Sennaciulo*. Ĝi konsistas plejparte el materialo ricevita antaŭ la kongreso. Tamen, ĝiaj ĉeftemo kaj redakta pritrakto estis influitaj de la kongresaj debatoj, pri kiuj vi ricevos detalan raporton en la venonta numero, jam en preparo.

Kiel antaŭvidite, du el la tri artikoloj en la marta-aprila temdosiero, plenkonscie aperigitaj post artikolo pri soldata interfratiĝo, vekis fortajn reagojn, lige kun la fortaj kontraŭaj opinioj esprimitaj pri la ŝtato Israelo. Ambaŭkaze la kritikitaj aŭtoroj ankaŭ plipreciziĝas sian penson ĉi-numere. La kongresaj debatoj montris, ke inter SAT-anoj ekzistas granda diverseco de opinioj pri la maniero mastrumi tiun diversecon de sintenoj, kaj pri la akcepteblaj limoj al esprimlibereco. La kerno tamen estas la partopreno de kiel eble plej multaj kamaradoj en la asocia vivo. Ni ne forgesu ke "*la organoj de nia Asocio estos tiaj, kiaj faros ilin la SAT-anoj mem*" (Lanti, 1926).

Al la temdosiero aldoniĝas pliaj kontribuoj pri aktualaĵoj tra la mondo, en Mezoriento, daŭre, kaj alikontinentaj. Ankaŭ ĉeestas historia kaj beletra rubrikoj. Fine sekvas diversaj informoj pri aktivaĵoj de LEA-anoj, kaj debato pri la rolo de la poresperanta fako. Vi ankaŭ povos legi la kasraporton, kiu estis kontrolita kaj aprobita dum la kongreso.

Agrablan kaj kontribu-vekan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2016: 31a de decembro 2016

Sennaciulo 11-12 (1337-1338): 20a de oktobro

Sennaciulo 1-2 (1339-1340): 20a de decembro

**Kovrilpaĝo**

"La plej bona peco", pentraĵo de Jomo Ipfelkofer

# Enhavo


### Nia dosiero : Esprimlibereco en Sennaciulo
4 Pri la artikolo "Zamenhof pravis" Nicolas Raymond
4 Antisemitisma kalumnio en Sennaciulo Markos Kramer
5 Ĉu judoj glutus la universon ? Michel Marko
5 Judoj kaj la judoj JSR (35501)
6 Zamenhof pravis (4) Roger Condon
8 Unuiĝintaj Nacioj kaj Israelo Kani
8 Mia vidpunkto pri Israelo Dominik Schramm
9 Ik ben Ksus Ĝemil Ksus

### Mezoriento plu
11 "Ni devas protekti la bonaĵojn, kiujn la revolucio alportis al la kurdoj."

### Tra la mondo
12 Nuntempa elmigrado de poloj Mir-Ko
15 Brita eksiĝo el EU kaj Esperanto Wolfgang Günther
15 Taktika fleksebleco, politika principo
17 Movado sen Nomo

### Sindikatismo tutmonda
18 Sud-Koreio : la morto de Han ne restu vana
19 Turkio : Ni subtenu la membrojn de la sindikato, kiuj batalas por savi la arbaron de Cerattepe
19 AFP : Postulu justajn laborkondiĉojn por la sendependaj fotistoj

### Historio
20 Eksterordinara okazaĵo en Neuville-Saint-Vaast Roland Platteau

### Beletro
21 Martelo Evgenij Georgiev (Espopore)

### Aforismoj kaj diroj
2 Viroj estas... EDonjo & Cezar

### El la LEA-oj
22 Prezento de la poem-antologio Nova mondo en niaj koroj Miguel Fernández
24 Noto de Libroservo de SATeH Libroservo de SATeH
25 La korto – la sekvantaĵo Kristian Lundberg
31 Raportaĵo el Japanio Suzuki Kazeto

### El la leterkesto
26 Traduki vortludojn... Serĝo Sir'
27 Rekorduloj Antonio De Salvo

### El la SAT-diskutejo
29 Ĉu Poresperanta Fako de SAT celu helpi kaj akceli la likvidon de LEA-oj ? Petro Levi, Gary Mickle

### El la SAT-administrejo
27 Financa raporto Bruno Henry
30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj
31 Nekrologo
31 Novaj aliĝoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***